

# LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPPSALA.

Kosto de abono por jaro:	Pago por anoncoj:
kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 =	15 öre = 15 pfenigoj = 20 centimoj =
frankoj 4,25 = rejsoj 1000 = rubloj 1,50.	8 kopekoj — por duonpaĝa petitlinio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Uppsala, Sverige.* (Svedujo.)

---

III:a jaro.

Januaro 1898.

N:o 1 (25).

---

## La nova jaro.

Al ĉiuj legantoj de nia gazeto ni deziras bonon, ĝojon kaj feliĉon en la jaro 1898.

Ke tiu ĉi jaro estos feliĉa por nia lingvo — oni povas ne dubi. La pligrandiĝo de la nombro da esperantistoj en ĉiuj landoj, la aliĝo de l' landoj, kiuj ĝis nun estis surdaj al nia voko, la belaj rezultatoj, atingitaj de niaj senlacaj amikoj en Francujo, la granda sukceso de la Odesa filio de la societo "Espero" en S.-Peterburg, la agado de la "Espero" mem, la formiĝo de l' novaj kluboj, la ĉiam progresantaj vojaĝoj esperantistaj, pli serioza rilato al ni de la tutmonda preso, — ĉio tio ĉi pravas, ke nia afero progresas regule kaj senhalte, kaj se eĉ en ia lando la vastiĝo de nia lingvo ne estos sukcesa en 1898 — la sukceso en aliaj landoj kovros la malsukceson en unu lando: sed ni eĉ ne vidas kaŭzojn de malsukceso en ia ajn lando: antaŭ ni kuŝas nebarita, kvankam longa vojo kaj ni nur devas iri antaŭen.

Oni jam ne unu fojon parolis sur la paĝoj de "Lingvo Internacia", ke ni *ne povas esperi tre rapidan progreson*\*), ĉar ni estis kaj estas en nefavoraj kondiĉoj. Tio ĉi estas vera kaj ni volas nur rimarki, ke ĉia efektiva sukceso nepre *rapidigos* nian progreson: se la amikoj de nia afero laboros en 1898 kun la sama energio, kiel en 1897, ili nepre atingos pli grandajn rezultatojn, ĉar ĉiu rezultato, atingita en pasinta jaro, alportos nun sian procenton: ĉiu pozitiva rezultato en nia agado estas procento, kiun oni ne konsumas, sed aligas al la kapitalo, kaj la kapitalo kreskas senhalte, kaj kun ĉiu nova jaro donas ĉiam pli kaj pli grandan procenton.

Por ke nia afero timu nenion, estas nur necese, ke nia gazeto estu kiel eble plej forta kaj sendependa. Tial ni denove memorigas al la amikoj de "Esperanto", ke ĉiu nova abonanto de "Lingvo Internacia" estas guto da freŝa sango, verŝita en la vejnojn de la granda organismo, nomata "movado

---

\*) Vidu ekz. la leterojn de s-ro L. de Beaufront el Francujo.

esperantista“. Ĉiu sukceso de la gazeto progresigos la aferon de vastigo de “Esperanto“, kaj returne, ĉiu sukceso en nia afero progresigos la gazeton, ĉar la sorto de la gazeto estas tute alligita al la sorto de nia lingvo. Danke al malgrandaj reformoj en la redaktado kaj korektado de “Lingvo Internacia“ ni atingis nun, ke ĉiu novaĵo, *sendata rekte en Uppsala'n* povas aperi sur paĝoj de “Lingvo Internacia“ du aŭ tri semajnojn pli frue, ol en la jaro pasinta: tio ĉi jam estas granda oportunaĵo, kiu ankoraŭ multe grandiĝus, se la gazeto povus esti eldonata pli ofte.

**La redakcio.**



## El Rusujo.

### Publikaj kursoj de Esperanto.

En mia antaŭa letero mi promesis skribi pri la unuaj entreprenoj de la Komitato de Odesa filio de la societo “Espero“. Plenumante tiun ĉi promeson, mi povas kuraĝe diri, ke la unua paŝo de la Komitato estis tre sukcesa kaj multe progresigis nian lingvon en Odessa. Mi parolas pri la aranĝitaj de la Komitato publikaj sistemaj kursoj de Esperanto. Dezirante doni al ĉiu la eblon facile konatiĝi kun nia lingvo, la Komitato sin turnis al la Kuratoro de la Odesa Instrua Distrikto kun la peto permesi la aranĝon de la publikaj kursoj de la lingvo Esperanto je sekvantaj kondiĉoj:

1) Ĉiu kurso konsistas el 8 lekcioj, legataj vespere, du fojojn dum semajno, en la Komerca Lernejo de H. I. Hoĥman (membro de la filio).

2) La nombro de apartaj kursoj dependas de la nombro de l' aŭskultantoj.

3) Por ĉiu kurso ĉiu aŭskultanto pagas 1 rublon (ĉirkaŭ 2,5 fr.), sed la Komitato havas la rajton liberigi de la pago tiujn, kiuj ne povas pagi.

La Kuratoro donis la necesan permeson kaj konfirmis la programon de la kursoj.

Tiam la Komitato tuj presigis la anoncojn pri la kursoj en ĉiuj odesaj gazetoj kaj invitis vizitadi la kursojn ĉiujn personojn, kiuj deziris fariĝi membroj de la filio. La komenco de la unua kurso estis fiksita la 7-an de decembro (25-an de novembro). Antaŭ tiu ĉi tago, la 5-an de decembro, la Komitato kunvokis komunan kunvenon de l' membroj de la filio por raporti al ĝi pri la kursoj. Kiel instruiston por tiu ĉi unua kurso la Komitato elektis Vian humilan servanton.

Ĉar ĝis la lasta tago la nombro de l' dezirantoj lerni nian lingvon estis tre malgranda, la Komitato elektis plej malgrandan klason de la lernejo de Hoĥman kaj pretigis la lokon por 20 homoj. Sed la 7-an de decembro, vespere la dezirantoj venis unu post la alia, la ĉambro fariĝis plene, oni ne sole okupis ĉiujn seĝojn, sed oni staris en la ĉambro kaj ekster ĝi, en la pordo. La nombro de l' apudestintaj estis ĉirkaŭ 45.

La 1-an de januaro (20-a de decembro) tiu ĉi unua kurso estis finita: ĝin konstante vizitadis ĉirkaŭ 40 homoj kaj kelkaj el ili fariĝis membroj de la filio. La dua kurso komenciĝos  $19/7$ -an de januaro kaj estos legata de s-ro S. O. Ŝatunovski. Se la nombro de l' aŭskultantoj estos granda, kredeble en la fino de januaro estos komencita la tria kurso.

Por doni la eblon al la membroj praktike uzadi la lingvon, la Komitato, laŭ la propono de s-ro Hoĥman, decidis aranĝi la ĉiusemajnajn *praktikajn*

vesperojn. Pri tio ĉi mi skribos, kiam estos ricevita la permeso de s-ro la Urbestro.

Skribante pri la kursoj mi uzas la okazon por sin turni al niaj amikoj kun la peto helpi al nia penado per korespondado kun niaj lernantoj: speciale mi min turnas kun tiu ĉi peto al s-roj eksterrusaj esperantistoj. Kiu deziras helpi, estas petata komuniki pri tio al la sekretario de la Societo, s-ro Gernet. Lia adreso estos komunikata al la lernantoj, kaj li devos nur korektadi la leterojn, adresatajn al li de la lernantoj, kaj resendadi tiujn ĉi korektitajn leterojn kune kun sia respondo. Tiamaniere niaj komencantaj esperantistoj estos tuj enkondukitaj en la rondon de l' esperantistoj, kaj, jam lernante la lingvon, vidos ĝian praktikecon, uzeblecon kaj forton. La svedajn amikojn, kiuj letere donis al mi sian konsenton, mi dankas tre kore.

La nombro de niaj membroj atingis 59. La jara pago estas 4 rubloj; ĉiu membro ricevas senpage "Lingvon Internacian", havas la rajton vizitadi senpage ĉiujn kursojn, praktikajn vesperojn, lekciojn k. t. p., kaj ankaŭ ricevas ĉiujn eldonojn de la societo tute senpage aŭ kun granda rabato.

Mi devas ankaŭ noti, ke la odesaj gazetoj konstante presas sciigojn pri nia societo kaj pri ĝia agado. Ili silentis komence, sed nun oni jam ne povas silenti, ĉar la societo kreskas kaj ĉiam pli interesas la publikon.

V. Gernet.



## El Francujo.

### La Paco per la Rajto.

La "Paix par le Droit", la "Paco per la Rajto", tia estas la bela titolo sub kiu prosperas nune la malgranda, sed kuraĝa societo, kiun fondis, antaŭ sep jaroj, kelkaj francaj junuloj, revantaj por la homaro pli belan idealon ol senfina malamo kaj hontaj interbuĉadoj. Kiel ni, la "Junaj amikoj de la paco" (kiel ili mem unue nomiĝis) ŝajne renkontis antaŭ si, kaj nun ankoraŭ renkontas ĉiutage, multajn kontraŭulojn kaj multajn kontraŭaĵojn: sed iom post iom, ili altiris al si novajn amikojn; ilia rondeto fariĝis vera societo, kiu nune, sub la nomo "la Paco per la Rajto", laboras prospere kaj efike por la granda afero de la interpopola fratiĝo; kaj ĝi eldonas, sub la sama titolo, monatan gazeton tre interesan, al kiu kunlaboras la plej talentaj ĉefoj de la movado paciga. La artikolo dua de ĝia regularo difinas ĝian celon per la sekvantaj vortoj: "La celo de la societo estas lernadi kaj diskonigi la rajtajn solvojn de la malkonsentoj internaciaj, kaj speciale altiri al tiu propagando la agemon de la junuloj." Tiu programo meritas la atenton kaj la simpatian de niaj amikoj; kaj tial mi pensis ke estus bone konigi al ili la societon kaj la ĵurnalon kiuj ĝin praktikas. Varman rekomendon por ambaŭ ni faras en tiu gazeto tiom pli volonte, ke ĝi estas sole justa reciproko por la helpo kiun ni trovas ĉe ili. Efektive, la redakcio de la "Paco per la Rajto" akceptis de mi tre kompleze longan artikolon pri Esperanto, kiu estis presita en la numero novembro; en la sama numero, unu el ĝiaj kutimaj redaktoroj faris sub la rubriko bibliografia, tre laŭdan raporton pri la broŝuro de s-ro Moch "La question d'une langue internationale, et sa solution par l'Esperanto", pri kiu s-ro de Beaufront jam parolis en la numero 22 de la "L. I."

— De tiuj ĉi artikoloj ni povas esperi bonajn rezultatojn, ĉar la legantaro

al kiu ili estas adresitaj estas jam entute favora al niaj ideoj. Estas do kompreneble ke ni faras la saman servon al tiuj novaj amikoj de la mondo pacema, konigante en la esperantistaro iliajn ideojn kaj ilian organon.

Sed oni ne sin trompu pri miaj intencoj: mi ne volas alion ol rekomendi la "Paco per la Rajto" al niaj amikoj *individue*. Mi tro plene aprobas la ideojn esprimatajn de s-ro de Beaufront pri tiu ĉi objekto, por konsili la kontraŭon. Cetere, en la konkludo de la artikolo kiun mi sendis al la "Paco per la Rajto", mi mem skribis: "mi tute ne konsilas oficialan kaj eksteran kuniĝon inter la esperantistoj kaj la pacemuloj; tro ofte oni riproĉas al ni ambaŭ, ke ni laboras por utopio! ni ne donu al la mondo la tenton vidi en ni duoblajn utopiistojn." La malfacilaĵoj, kiuj staras kontraŭ la ideo de lingvo internacia, estas jam sufiĉe grandaj, por ke ni devu zorge eviti ĉion kio povus ilin kompliki. Farinte tiujn rimarkojn, mi pensas ke la "Paco per la Rajto" estas unu el la societoj pacaj, kiuj plej multe meritas nian simpatian; kaj mi estas konvinkita ke la interesaj artikoloj de ĝia ĵurnalo estos tre plezure legataj de niaj amikoj.

La "Paco per la Rajto" estas eldonata regule en la fino de ĉiu monato; ĉia numero enhavas ĉirkaŭe 30 paĝojn (en lingvo franca); la jara abono kostas 2 frankojn 50 centimojn. La redakcio publikigas ankaŭ en la komenco de ĉiu jaro la "Almanakon de la Paco", kiu kostas 25 centimojn. La Almanako por 1898, kiu enhavas artikolojn de s-ro Leroy-Beaulieu, Frédéric Passy, Richet, Monod, Hodgson, Pratt, k. a., estas ricevebla de s-ro *Laune*, bibliotekisto de la societo, 10 Rue Monjardin, à *Nîmes* (France); al li ankaŭ oni devas sin turni por la abonoj.

René Lemaire.

—>❖<—  
Novajoj.

Ne promesis — sed jam plenumis!

"*Le Petit Bleu*" (Brukselo, Belgujo), en n-ro 16 de tiu ĉi jaro, sciigas legantojn, ke la gazeto fabrikigis la presajn literojn, kiuj estas necesaj por preciza presado laŭ la alfabeto de s-ro Zamenhof, kaj en la dimanĉa aldono regule publikigos mallongajn ĥronikojn en Esperanto kun traduko. Ankaŭ, ĝi donos inter dimanĉaj konkursoj tekstojn por traduki de Esperanto en francan lingvon aŭ turnavice.

Ĉe la Centra Oficejo de la gazeto ĉiuj libroj esperantistaj estas riceveblaj. Ni ne dubas, ke danke al tio la gazeto trovos abonantojn inter la esperantistoj kaj tre progresigos nian lingvon en Belgujo.

\* \* \*

Kapitalo de d-ro Zamenhof.

Por tiu ĉi kapitalo alsendis oferojn al s-ro Gernet: s-ro *I. M. Lojko* — 10 rublojn; s-rino *E. Mankovskaja* — 4 r. 80 k.; s-rino *M. Sereda* — 2 r. 45 k.; *A. Slucki* — 1 r.


\* \* \*

— Oni skribas al ni, ke en la "Kúrsoj de novaj lingvoj de s-ro Eĉinac" (S.-Peterburg, Dmitrovka, N:o 1) estas enkondukita ankaŭ la lingvo Esperanto.

\* \* \*

**Pri la lingvo Esperanto parolis:** En N:o 185 de ĉiutaga gazeto "*Ĵizn i Iskustvo*" (Vivo kaj arto), eldonata en Kiev, estas presita mallonga noto pri la odesaj esperantistoj.

— La leŭtenanto Ch. Lemaire sendis al la redakcio de nia gazeto la numerojn 351, 353, 355, 357, 359, 362, 364 (de 1897) kaj 1 (de 1898) de la Bruksela gazeto ĉiutaga "*Le Petit Bleu*", enhavantajn serion da artikoloj pri la problemo de lingvo internacia entute kaj pri Esperanto aparte. La artikoloj, plena lernilo de nia lingvo, estas skribitaj en la energia, konvinka, elokventa stilo, propra al la plumo de niaj francalingvaj samideanoj. La verkinto intencas unuigi la artikolojn en broŝuro propaĝanda, disdonota senpage. "*Le Petit Bleu*" estas unu el la ĵurnaloj plej multe konataj kaj disvastigataj tra Belgujo.



## Letero al la redakcio.

Mi estas malĝojigita per la anonco de la redakcio staranta en komenco de n-roj 8—9, 1897. En ĝi, ŝajnas al mi, inter senkulpiĝoj de la redakcio pro malfruado en eldono de la ĵurnalo, estas ankaŭ aŭdebla kvazaŭ propra paciĝo de la redakcio kun tiaj malfruadoj, kvazaŭ esperigo de legantoj de la L. I. ke similaj malfruiĝoj okazados ankoraŭ en pluaj tempoj, kaj ke ne estas eĉ taŭga fari al ili grandan atenton, ĉar leganto ricevos ja siajn 192 paĝojn da presaĵo Esperanta en jaro... Kiel ne malĝoji pro tia stato de faroj?!

Ĉiu el ni bonege scias ke eldono de nia ĵurnaĵeto estas afero neniel profita; ke la eldonantoj laboras ege senprofiteme, ke ili estas homoj havantaj multajn proprajn rektajn okupojn kaj devojn; ke tiu eldonado, pro kelkaj neciteblaj kaŭzoj, estas provizita je klopodoj kaj malagrabloj. Tial Dio gardu nin rilati nin al ĉiuj haltigoj redakciaj, intaj kaj ontaj, eĉ kun ombro de riproĉo! Kontraŭe, mi estas firma en konscio ke homoj sinfororgeseme ŝarĝintaj sin je administro de nia ĵurnaĵeto indas nur nian dankon... sed estas natura malĝoji pri tiu stato de la faro Esperanta, ĉe kiu kajereto da 16 paĝoj turmente formiĝas kaj ne sukcesas formiĝi en monata daŭro.

En kontraŭo al dirito de la redakcio mi opinios ke la parto de novaĵoj pri Esp., ĉiuj scioj pri la movo de nia afero, leteroj de esperantistoj kaj respondoj al ili estas la plej grava parto, kaj mi metas belverkaĵon kaj rakontetojn sur plano tute malantaŭa. Mi pensas ke tiu opinio indas esti nomita serioza. La ĉefa temo de nia ĵurnalo ne estas donadi al ni legmaterialon (neniu, supozas mi, estas suferanta je manko de tiu materialo); ĝi konsistas en ĉiama subteno inter esperantanaro intereson al vivo kaj vastigo Esperantaj, en sciigoj nin, eble rapidaj, pri ĉio kio okazas en ujo de Esperantismo, en servo al ŝanĝo de pensoj kaj intencoj de diversaj entreprenemaj personoj kiuj, danko al Dio, ekzistas inter ni... Sed kiu havos volonton fari kelkan demandon, aŭ doni sian opinion, se li estas certa ke unu kaj alia ekvidos lumon nur post 1 $\frac{1}{2}$ , 2 monatoj.

Ĵurnalo kiu tra sufiĉe longaj tempspacoj alportas al mi rakontetojn, historietojn kaj versojn de plej komuna karaktero (kiajn mi povas ĉiam kaj ĉie havi) enlulas min, malvarmigas mian intereson al celo al kiu ĝi servas. Mi estus tre ĝoja se redaktoroj de la L. I. dividus mian opinion kaj juĝus bezona vivigi nian dormeman gazeton. Kion oni devas por tio fari?... Mi

pensas ke la plej grava estas oftigi ĝian aperadon, eniri per ĝi en pli viva interŝanĝo de pensoj kun legantoj, fari al ili demandojn kaj temojn, postuli de ili tiujn kaj aliajn solvojn, ekscii de ili novaĵojn... Nia gazeto devas esti almenaŭ duonmonata. Se tio elvokos grandigon de abonpago, oni ne devas timi ĝin; la nuna pago estas tiel negranda, ke duobligo de ĝi ne povas tro ĝeni abonanton. Por faciligo oni povas starigi pagon perpartan, fari krediton, uzi rimedon (iom trudeman, mi konfesas) elpensitan per kelkaj francaj redakcioj: oni dissendas provmaniere gazeton kun avizo, ke se rifuzo aboni ne estas letere farota, tio estos akceptita kiel konsento aboni...

En ĝia nuna stato nia gazeto, mi ripetas, estas tro mallerta, neagema, dormigema. Estas necese komuniki al ĝi iom da fajro kaj movo; kaj tio ĉi ne ŝajnas al mi nepovebla. Havas ni ja tiajn agulojn kiel s-ro A. Zakrjevskij, kiu estas ema postuli de agentoj Esperantaj preskaŭ ofican plenumemecon en spirito tute milita.

La duan malhelpon en montrata vojo — mi vidas en la difina amplekso de la ĵurnalo. La redakcio de la L. I., dezirante esti plenumema kaj senriproĉa, nepre zorgas pri la dono de 16 paĝoj en ĉiu numero. Sed ĉu tio ĉi estas grava? Ĉu la legantoj de L. I. bezonas je livero de literatura materialo laŭ mezuro kaj pezo? Mi pensas ke tiu ĉi paĝa ŝuldigo devas tuj esti forĵetita kiel neniel bezona. Lasu aperi numerojn en duona, eĉ kvarona amplekso. Sed donu ilin pli baldaŭ.

Mi petas sinjorojn esperantanojn, kies partopreneco al nia afero staras supre ol punkto de frostigo eldiri sin laŭ la senco de miaj proponoj.

Kun plena estimo.

A. Z.

---

## Pri la celoj kaj problemoj de la societo "Espero".

Parolo de A. M. ARNOLD en la Unua komuna kunveno de la Odesa Filio de la societo "Espero".

Altestimataj sinjorinoj kaj sinjoroj,

Ĉar al mi elfalis la honoro malfermi la unuan komunan kunvenon de la Odesa filio de l' societo "Espero", — mi permesos al mi diri kelkajn vortojn pri la celoj de la malfermata societo.

La societo "Espero" ekzistas nur kelkajn jarojn, kaj la nun malfermata Odesa filio estas la unua ĝia provinca filio. Estas, tial, tute komprenebla, ke en la publiko la informoj pri la celoj de tiu-ĉi societo estas ankoraŭ tre malmulte vastigitaj.

Tiuj-ĉi celoj, kvankam mallonge sed plene precize estas klarigitaj en la unua paragrafo de nia regularo, diranta, ke "La societo 'Espero' havas la celon, por faciligi la internaciajn komunikiĝojn de komerco, sciencoj, literaturo k. c., helpi al la vastiĝo de la lingvo internacia "Esperanto" kaj doni al ĉiuj personoj, interesantaj sin je tiu-ĉi lingvo, eblon de la plej proksima kuniĝo."

Tiamaniere vi vidas, sinjoroj, ke paroli pri la celoj de nia societo — tio ĉi signifas paroli pri la lingvo, konata sub iom strange sonanta nomo "Esperanto", — kaj pri tiuj celoj, kiujn celadis la personoj, kreintaj tiun ĉi lingvon kaj vastigantaj en la publiko la konatiĝon kun ĝi.

La lingvo "Esperanto" estas arte kreita lingvo, difinita speciale por la faciligo de la interkomunikiĝoj de la personoj, apartenantaj al diversaj nacioj. Iom stranga ĝia nomo "Esperanto" aperis tute okaze: la aŭtoro de tiu ĉi lingvo, rusa kuracisto Ludoviko Zamenhof, eldonis sian unuan broŝuron pri ĝi sub la pseŭdonimo "Esperanto" kaj iom post iom, tute nerimarkate, la pseŭdonimo de la aŭtoro fariĝis la nomo de la lingvo. Malgraŭ ĝia stranga sono tiu ĉi nomo propriĝis al la lingvo, sub tiu ĉi nomo la lingvo faradis siajn unuajn paŝojn, fariĝis kara al la unuaj siaj adeptoj -- kaj ni ne vidas seriozajn kaŭzojn por aliigi tiun ĉi nomon.

Laŭ sia esenco la lingvo "Esperanto" estas nome "internacia" lingvo kaj per tiu ĉi nomo plej bone kaj plej precize difiniĝas ĝia celo kaj signifo.

Mi permesos al mi haltiĝi dum kelkaj minutoj sur tiu ĉi nomo "internacia" por klare difini la rilaton de la lingvo "Esperanto" al la ekzistantaj naciaj lingvoj. Antaŭ ĉio mi devas kategorie kaj decide diri, ke nia lingvo tute ne pretendas la rolon de la tutmonda lingvo, je kiu en unu bela tago komencus paroli ĉiuj homoj kaj kiu elpuŝus kaj anstataŭigus per ĝi mem ĉiujn la ekzistantajn lingvojn. Tute kontraŭe, la lingvo "Esperanto" estas tiel malvaste kunligita kun la plejmulteco de la ekzistantaj lingvoj de l' kulturaj nacioj, ke sen ilia ekzistado kaj progreso — estus tute ne ebla ankaŭ la ekzistado kaj progreso de nia lingvo. Nek la aŭtoro de tiu ĉi lingvo, nek liaj plej proksimaj adeptoj, nek unu el la societoj kaj kluboj, celantaj la vastigadon de "Esperanto", — neniam pensadis trudi al ĝi la rolon de la "universala" lingvo. Bedaŭrinde, en kelkaj broŝuroj, dediĉitaj al nia lingvo, aperis — kiel sekvo de simpla malkompreniĝo — la epiteto de la "tutmonda" lingvo, kaj tiu ĉi ne prospere uzita epiteto servis kiel preteksto — al moko kaj ŝercetoj de unu flanko, kaj de alia — al la energiaj, seriozaj rediroj kontraŭ la ideo mem de la lingvo. Mi ripetas — tio ĉi estas nur rezultato de la simpla malkompreniĝo.

En la vivo de la popoloj la nacia lingvo ludas tro grandan rolon, por ke kies ajn mano sin levus kontraŭ ĝi. Apude la teritorio, kulturo kaj religio — unu komuna lingvo servas kiel plej esenca signo de la nacio. Estas ankoraŭ pli: homoj, vivantaj sur diversaj teritorioj, submetitaj al la diversaj politikaj estraroj, konfesantaj diversajn religiojn, sed parolantaj unu komunan lingvon sentas sin kiel parencaj membroj de unu sola familio. La malkonfeso de la patra lingvo estas ne malpli malfacila, ol la malkonfeso de la subuleco aŭ de la naska religio. Kaj estas tute ne versimila, ke aperos adeptoj de l' homo, kiu komencus paroli pri la neceso forigi la naciajn lingvojn kaj anstataŭigi ilin — kvankam eĉ en la malproksima estonteco — per unu arta lingvo, komuna al ĉiuj homoj.

Ne, estimataj sinjoroj! La adeptoj de la lingvo "Esperanto" entute — kaj nia societo aparte — neniam pensadis pri tielaj neeblaĵoj. Neniam venadis al ili en la kapon la ideo forigi la ekzistantajn lingvojn kaj igi ĉiujn la homojn paroli en "Esperanto". Ili turnis ilian atenton al tute alia flanko kaj donis al si tute alian celon. Ilia ideo estas nek ia malklara, neefektivebla fantazio, nek ia utopio, atencanta la naturan amon de l' homo al lia patra lingvo. Ilia ideo estas vivanta, praktike efektivebla afero, kiu povas alporti grandegan utilon al la homaro!

Ju pli disvolviĝas, fortikiĝas kaj apartiĝas la naciaj lingvoj — des pli kaj pli malfacilaj fariĝas la reciprokaj komunikiĝoj de l' homoj de la diversaj nacioj, aparte se oni donas vastan sencion al la vorto "komunikiĝoj". Nur

antaŭ kelkaj centjaroj unu verko, eldonita en la latina lingvo povis esti rigardita kiel propraĵo de ĉiuj instruitaj homoj, al kia ajn nacio ili apartenus. Ne malproksime de ni estas la tempo, kiam la franca lingvo preskaŭ anstataŭigis la latinan. Kaj ankoraŭ antaŭnelonge unu verko, tradukita en du aŭ tri plej ĉefajn lingvojn, povis esti rigardita kiel alirebla al tuta la rondo de l' kulturaj homoj, nedepende de ilia nacieco. Sed komencante de la dua duono de la XIX centjaro la afero ŝanĝiĝas. Sur la tutmonda areno de la kultura vivo sin ŝovas antaŭen la novaj nacioj. Apude la movado al la politika unuiĝo de l' nacioj — aperas la zorgo pri la escepta uzado de la nacia lingvo en la literaturo, artoj kaj scienco, la zorgo pri ĝia purigo de la fremdaj influoj. La scienco, restante tutmonda propraĵo, partumiĝas, tiel diri, inter la prezentantoj de la diversaj nacioj. Oni povas aŭdi la esprimojn: "la angla lernejo en la psikologio", "la grupo de la italaj psiĥiatroj", "la rusa lernejo en la medicino", "la prezentantoj de la franca medicina scienco" k. c. En la literaturo sin ŝovas antaŭen la nomoj de la skandinavaj kaj slavaj verkistoj, ĝis nun preskaŭ nekonataj al la eŭropa mondo. La scienca aŭ literatura verko devas esti tradukita en ses, sep, dek lingvojn — kaj nur tiam ĝi fariĝas propraĵo de la tuta instruita homa societo.

Kaj malgraŭ ĉio tio ĉi — la ellernado de la fremdaj lingvoj en la komuna sistemo de la instruado preskaŭ ĉiuloke pli kaj pli sin ŝovas al la malproksima plano. Tiu ĉi apero estas, cetere, tute komprenebla. La grandegaj paŝoj, faritaj per la naturaj sciencoj en la lasta centjaro preskaŭ tute ŝanĝiĝas tiun mezuron, per kiu estis mezurita iam la "meze instruita homo". La nepra kondiĉo de l' rajto aparteni al la homoj "meze instruitaj" fariĝis la konatiĝo kvankam eĉ kun la fundamentaj leĝoj de la fiziko, ĥemio, biologio, geologio kaj kun tiuj branĉoj de matematiko, kiuj estas necesaj por ellernado de tiuj ĉi sciencoj.

Ĉio tio ĉi postulas tempon — kaj estas tute komprenebla, ke la kvanto da tempo, kiun oni povas doni al la ellernado de la fremdaj lingvoj — fariĝas pli kaj pli malgranda. Fine, la rondo de la instruita homa societo pli kaj pli disvastiĝas, demokratiĝas — kaj kiu do ne scias, ke la scio de la fremdaj lingvoj preskaŭ ĉie kaj ĉiam, laŭ tre kompreneblaj kaŭzoj, estis kvaŝaŭ privilegio de la plej riĉaj klasoj de la societo?

Oni devas memori ankoraŭ, ke la ellernado de la vivanta fremdlanda lingvo estas afero tute ne facila, ke oni devas komenci ĝin de la infana aĝo kaj daŭrigi preskaŭ ĝis la matura. Alie la konatiĝo kun ĝi malofte estos plena. Efektive, ĉu oni devas rememori, kiom da malfacilaĵoj devas venki slavo por ekposedi la germanan gramatikon, kiom da tempo estas bezona por germano, ellernanta la francan aŭ anglan ortografion, kaj per kia longa vojo atingas anglo aŭ italo la konatiĝon kun rusaj deklinacioj kaj konjugacioj? Mi ne parolas jam pri la plena konatiĝo kun la vivanta fremdlanda lingvo, kun ĝia spirito kaj vivo: tiu ĉi apero renkontiĝas tre malofte. Homoj, je la unua rigardo libere parolantaj france aŭ germane, tre ofte ne povas iel kunlige traduki je la patra lingvo eĉ kelkajn frazojn de unu pli aŭ malpli serioza verko. Kaj returne: la personoj, libere legantaj angle, eĉ tradukantaj la anglajn verkojn en la patran lingvon — ne malofte renkontas multajn malfacilaĵojn, se ili estas igitaj paroladi kun unu anglano pri la tute ordinaraj objektoj aŭ skribi ne kunmetitan komercan leteron en la angla lingvo. Kaj eĉ la personoj, efektive parolantaj, legantaj kaj skribantaj en la fremda lingvo — tre ofte rifuzas diri kelkajn vortojn en tiu ĉi lingvo en kia ajn publika kunveno.



Kaj tamen la bezono de la reciproka kompreniĝo ĉe la diversaj nacioj grandiĝas ĉiutage. Pli kaj pli kreskas la konscio, ke sen la konatiĝo kun la vivo de la najbaraj nacioj, kun ilia literaturo, scienco kaj kulturo — la instruado de l' homo fariĝas neplena kaj nesufiĉa. Mi ne parolas jam pri nia patrujo aŭ pri la Germanujo: en la ambaŭ landoj, — povas esti laŭ tute diversaj kaŭzoj, — tiu ĉi konscio enradikiĝis jam antaŭ longe. Sed en la lasta tempo eĉ en Francujo kaj Anglujo — du klasikaj landoj de la preskaŭ plena nesciado de tio, kio fariĝas apud ili, — eĉ en tiuj ĉi landoj disvolviĝas la movado al la konatiĝo kun alilanda scienco, literaturo, historio kaj kulturo.

Kaj ju pli progresadas tiu ĉi konscio, ju pli malvaste unuiĝas la naciaj grupoj kun iliaj apartaj lingvoj, ju pli grandiĝas la nombro de tielaj grupoj, aliĝantaj al la familio de la kulturaj popoloj, — des pli kaj pli klariĝas la utileco, preskaŭ la senkondiĉa neceso de unu komuna lingvo, en kiu povus interkomunikiĝi inter si la homoj de la diversaj nacioj.

Plej frue tiu ĉi bezono sentiĝas en la literaturo kaj scienco. Efektive, estas malfacila eĉ prezenti al si, kiela maso da laboro estas necesa en nuna tempo por fariĝi kian ajn literaturan verkon alirebla por tuta la leganta publiko, en kiom da lingvoj oni devas traduki ĝin, kiom da fojoj estas necesa peceti, premeti aŭ distiri ĝin, pakante en la kadretojn de la fremda lingvo, ofte tute ne konanta tiujn frazturnojn, tiujn apartecojn kaj vivantajn, figurumajn esprimojn, kiuj estas propraj al la patra lingvo de la aŭtoro. Kaj fine, kiom da tiuj tradukoj povas esti nomataj kontentigaj? Du aŭ tri el unu deko, ne pli!

En la regiono de la scienco tiu ĉi demando fariĝas ankoraŭ pli persistanta. La internaciaj sciencaj kongresoj fariĝis jam preskaŭ nepre neceso de la vivado kaj progresado de la scienco. La viva interŝanĝo de la ideoj kaj eltrovoj, la persona reciproka konatiĝo de la prezentantoj de la scienco — estas malcerte, ke ĉio tio ĉi estu forgesita kaj forlasita. Sed tamen, kio fariĝas en tiuj ĉi kongresoj rilate la lingvo? Estas sufiĉa rememori la tuj finiĝintan internacian medicinan kongreson en Moskvo. En tiu ĉi kongreso oni faradis raportojn kaj sciigojn, oni diradis parolojn kaj salutojn en rusa, franca, angla kaj germana lingvo — kaj oni povas prezenti al si, kiom da fojoj — el la nombro de kelkaj miloj da kongresanoj — tutaj centoj komprenadis preskaŭ nenian vorton el tio, kio estis elparolata antaŭ ili! Tiel estas nun, kaj estas permesita demandi sin, kion do prezentados tielaj kongresoj post kelkaj dekjaraj, kiam oni komencos paroladi en ili en la itala, sveda, bohema, hungara lingvo, povas esti eĉ en la serba aŭ bulgara? Kaj tio ĉi povas esti, tio ĉi devas esti, ĉar ĉiuj tiuj ĉi nacioj celadas fariĝi plenrajtaj membroj de la grandega internacia scienca familio.

La praktika vivo ne restas post la literaturo kaj scienco. La relaj vojoj de unu lando estas pli kaj pli kunligataj kun la fervojoj de la najbara lando; la telegrafoj, la poŝtoj — fariĝas tutmonda propraĵo. La internaciaj kongresoj pri la demandoj poŝtaj, telegrafaj kaj fervojaj — fariĝis jam absoluta necesajoj. Oni ellaboras tarifojn de la rekta komunikiĝo ekzemple inter London kaj Odessa, preskaŭ tra la tuta Eŭropo, kun la partopreno de granda vico de la plej diversaj transveturigantaj entreprenoj. Kaj estas demandinda, en kiom da lingvoj estas farataj la necesaj por tio ĉi komunikiĝoj, kiom da fojoj ili estas tradukataj, klarigataj, kiom da eraroj kaj malkompreniĝoj fariĝas nur danke al la diverslingveco kaj reciproka nekomprendado?

Ĉu estas bezona, post tio ĉi, paroli pri la privataj interkomunikiĝoj: komercaj, mastrumaj, juristaj k. c.?

Jen, estimataj sinjoroj, nome en tiu ĉi sfero devas trovi por si uzadon la lingvo Esperanto. En tiu ĉi sfero nome tiu ĉi lingvo devas ricevi preferon antaŭ ĉiuj ekzistantaj naciaj lingvoj laŭ du plej ĉefaj kaŭzoj:

1) Tiu ĉi lingvo estas lingvo neŭtrala, apartenanta al nenia nacio aparte, kaj tial ĝia uzado kiel ilo de la internaciaj komunikiĝoj povas kroĉi nenies nacian memamon kaj ne povas eksciti demandojn pri la kaŭzoj de ĝia preferado.

2) Tiu ĉi lingvo estas tre facila, tre rapide ellernebla neordinare fleksebla kaj en la plej granda grado kapabligita al la transdono de la plej diversaj turnoj de l' parolado, propraj al la plej diversaj lingvoj. Fine tiu ĉi lingvo por ĝia uzado postulas plej multe da konsidero kaj logiko kaj plej malmulte da penoj de la memoro.

Mi ne tuŝos la konstruon kaj la apartecojn de la lingvo Esperanto, mi ne komprenigados, kial nome tiu ĉi lingvo, sed ne aliaj similaj sistemoj, estas elektita per nia societo por la vastigado. Ĉion tion ĉi faros la personoj, en tiuj ĉi demandoj pli kompetentaj ol mi. Mi rememoros nur al vi, estimataj sinjoroj, ke la plena taŭgeco de nia lingvo al la transdono de la literaturaj verkoj de la plej diversaj nacioj kaj epokoj, al la reciprokaj skribaj kaj buŝaj interkomunikiĝoj — estas pruvita praktike. Ni havas vicon de la presitaj tradukoj el diversaj lingvoj en la lingvon Esperanto, kaj la faktoj de la uzado de tiu ĉi lingvo por la reciprokaj buŝaj kaj skribaj interkomunikiĝoj de la diversnacioj estas publikigitaj en la gazetoj, eldonitaj kaj eldonataj en tiu ĉi lingvo.

Mi permesos al mi nur ripeti tion saman, je kio mi komencis: per la supretrajtita sfero de la internaciaj komunikiĝoj la rolo kaj signifo de la lingvo Esperanto estas plene difinitaj kaj elĉerpitaj. Se venos iam la tempo, kiam por ĉiu instruita homo estos sufiĉa la sciado nur de du lingvoj: lia patra kaj internacia; se la sciado de tiu ĉi lasta lingvo estos vastigata tiel, ke la traduko de kia ajn scienca aŭ literatura verko en la "Esperanto" estos sufiĉa por la konatigo de la plejmulteco de la instruitaj homoj kun tiu ĉi verko; se en ĉiuj tiuj ĉi okazoj, kiam renkontiĝos la diversnacioj, parolantaj en diversaj patraj lingvoj, aŭ ili speciale kunvenos por priparolado de la komunaj demandoj — se en ĉiuj tiuj ĉi okazoj estos buŝe kaj skribe uzata la lingvo "Esperanto" — tiam la celoj de la aŭtoro de l' lingvo kaj sekve la celoj de nia societo estos plene kaj tute atingitaj.

Iri pli antaŭen, atenci la netuŝeblecon kaj neŝanceligecon de la naciaj lingvoj, provi elpuŝi kaj anstataŭigi ilin, spite la historion kaj naturajn sentojn de la apartaj homoj kaj nacioj — tielajn fantaziajn celojn la lingvo "Esperanto" ne havas.

Tute kontraŭe — tuta vortara kaj gramatika materialo de tiu ĉi lingvo estas pruntita el la vivantaj naciaj lingvoj; se kreskos kaj disvolviĝos la internaciaj komunikiĝoj — tiam devas kreski kaj disvolviĝi la internacia lingvo, devas aperi novaj internaciaj terminoj kaj turnoj de la lingvo. Prunti ilin la lingvo "Esperanto" devas el tielaj samaj vivantaj lingvoj, elektante la plej kompreneblajn kaj la plej prosperajn. Kaj ju pli rapide, ju pli plene iros la disvolviĝo de la naciaj lingvoj — des pli granda kaj riĉa estos la materialo por la lingvo internacia.

Mi permesos al mi haltiĝi ankoraŭ sur unu detalo de tiel diri psikologia eco. Je mia persona rigardo — la ellernado de l' lingvo Esperanto, ĝia praktika uzado por parolado, skribado kaj ĉefe por tradukado — devas plej

forte kunhelpi al la plena ellernado de la patra lingvo kaj fortikado de la amo al ĝi. Ni ĉiuj pensas en nia patra lingvo; ni tiel kutimas al ĝiaj formoj, ĝiaj originalaj frazturnoj, ke ne malofte ni nur laŭ kutimo uzas ĝiajn plej belajn esprimojn, donante al ni raporton nek pri ilia profunda senco, nek pri ilia beleco kaj originaleco. Tradukante en kian ajn fremdan lingvon ni devas multe pli pensi pri la signifo de ĉia frazo, pri la delikata senco de ĉia vorto kaj observadi la originalecon de la frazturnoj. Sed dume ni havas aferon kun la vivantaj fremdaj lingvoj, ni devas nevole nur serĉi la plej proksimajn esprimojn, ni devas pensi ĉefe pri la uzado de la vortoj kaj frazturnoj, la plej propraj al la fremda lingvo, ne malofte ankaŭ kaprica kaj originala: en unu vorto, ni devas ĉefe observi la regulecon de nia fremdlingva esprimado, oferante al ĝi la originalaĵojn kaj belajĵojn de la tradukata patralingva teksto. La afero estas iom alia, se ni tradukas en la lingvon "Esperanto", kies konstruo estas submetita preskaŭ escepte al la leĝoj de logiko kaj estas libera de la kutime aligitaj formoj kaj frazturnoj.

Tie ĉi estas nur bezona pli profunde pensi pri la logika senco de la tradukata esprimo, observi ĝiajn karakterajn apartaĵojn, ĝian originalan belecon — kaj la iloj por ĝia plej preciza kaj plej komprenebla traduko aperas preskaŭ senpene. En nenia el la vivantaj lingvoj oni povas transdoni la originalan fremdlingvan verkon kun tiela preskaŭ litera precizeco, kun tiela preskaŭ plena konservado de la apartecoj de l' aŭtora stilo, kiel oni povas fari tion ĉi en la lingvo Esperanto. Kaj jen kial, ĉe la tradukado en tiun ĉi lingvon, kiel ĉefa zorgo de la tradukanto aperas ĉiam la plena kaj preciza kompreniĝo de la tradukata teksto, de la plej malgrandaj detaloj kaj nuancoj de la esprimita penso, de la karakteraj apartecoj de la ekstera formo; jen kial ĉe tiela laborado elklariĝas al ni tielaj belecoj, tielaj trezoroj de la patra lingvo, preter kiuj ni ordinare trairadas preskaŭ senatente; jen kial disvolviĝas la sciado kaj fortiĝas la varmega amo al la patra lingvo.

Petante pardonon pro tiu ĉi malgranda flankiro, mi devas eldiri, ke parolante pri la lingvo internacia, mi tuŝis la celojn de nia societo nur en plej vastaj trajtoj. La prilaborado de la praktikaĵoj, la elserĉado de iloj por ilia efektiviĝo kaj fine la praktika efektiviĝado ilin — ĉio tio ĉi eniras en la rondo de l' agado de la komitato, kiun vi hodiaŭ elektos. Kelkaj el tiuj ĉi temoj estas jam nun rimarkeblaj: la vasta dissciigado de la informoj pri nia lingvo, la aranĝado de la kursoj kaj publikaj paroladoj, la eldonado de la tradukoj, la ellaborado de l' sciencaj kaj teknikaj dialektoj k. t. p. Sed estas komprenebla, ke en tiela nova kaj malfacila afero la estonta komitato ne povos sukcese agadi sen la kunhelpo de ĉiuj membroj de la societo. Ne tiam sole kiam ni venas al la komunaj kunvenoj — devas ni pensi pri la kunhelpo al la komitato; tiu ĉi kunhelpo devas esti konstanta kaj senhalta. Disvastigu la informojn pri nia lingvo, faru tradukojn, skribu originalajn artikolojn, konatigu kiam vi povas kaj kiun vi povas kun la celoj de nia societo — kaj ni esperu ke per komunaj penoj prosperos al ni movigi antaŭen la aferon, promesantan al ĉiuj instruitaj homoj tiom da grandegaj profitoj kaj oportunajoj, liberigantan ilin de la amaso da senfrukta laboro kaj donantan al ili en la manojn tielan potencon ilon de la reciproka komuniĝo!


Fine, estimataj sinjoroj, mi devas diri kelkajn vortojn ankoraŭ pri unu cirkonstanco. Mi ne scias kial — sed en la societo kaj en la preso estas tre vastigita jom ironia rilatiĝo al la lingvo Esperanto entute kaj al nia societo aparte. Ĉu tio ĉi dependas de tio, ke la ideo de la internacia lingvo entute

estas ne sufiĉe klare komprenita kaj ne juste taksita; ĉu de tio, ke oni estas tro malmulte konatigita kun la sistemo de la lingvo "Esperanto", aŭ simple de tio, ke ĉe ni estas jam tro vastigita la kutimo ŝerci kaj moki ĉion senpensume — mi ne kuraĝas priparoli kaj solvi tielajn demandojn. Sed fakto restas fakto: nia societo ne havis eĉ tempon formiĝi kaj esti malfermita — kaj tiela ironia rilatiĝo al ĝi jam tie kaj tie ĉi aperadis. Estas tre eble, ke ankaŭ post nun estos tio sama, kaj ke multaj el ni estos ŝercigitaj kaj mokigitaj sub la nomo de "Esperantistoj". Estas komprenebla, ke tiela rilatiĝo aperas kiel granda malhelpo al nia agado, kaj ke nia societo, ne laŭ ĝia agado — la agado estas antaŭ ni — sed laŭ ĝiaj celoj havis rajton antendi iom alian rilatiĝon nome de la flanko de l' preso. Sed ĉar tio ĉi okazis — estas necesa paciĝi kun tiu ĉi cirkonstanco. Ĝi devigas nin sendube al la plej granda singardemeco en nia praktika agado, ĉar al neniu povas esti agrabla vidi, ke la amata afero fariĝas celo de la ŝercoj kaj pseŭdospritaĵoj. Sed ĉio tio ĉi tute ne devas malvarmigi nian fervoron.

Rememoru, sinjoroj, ke ne sole la grandegaj ideoj de l' homa genio en certa grado de ilia disvolvigo, sed ankaŭ la pli malgrandaj eltrovoj, kiuj servis por la perfektigado kaj oportunigado de la ĉiutaga homa vivo, tre ofte estis renkontitaj per ŝercoj kaj moko, ofte eĉ kruelaj kaj senkompataj. Estas al mi ne dezirinda rigardigi tielajn precedentojn, kiel la ideo de la globa formo de l' tero, de la turnado de l' tero ĉirkaŭ la suno, aŭ kiel la elpenso de uzi la vaporan elastecon por movado kaj la diverspezecon de l' gasoj por aeraj flugadoj. Estus, kredeble, ne tute oportuna rememori tie ĉi la grandajn nomojn de Kolumbo, Galilei, Kopernik, Watt, Stephenson aŭ de gefratoj Montgolfier. Mi permesas al mi doni multe pli modestan kaj simplan ekzemplon el la sfero de la praktika vivo, — ekzemplon, ankoraŭ antaŭ nelonge rakontitan en multaj gazetoj. Ĉe la kortego de unu el la francaj reĝoj en la mezaĝo oni unuafaje komencis uzadi forkojn por manĝi la viandon. La ĥronikisto, priskribinta la vivon ĉe la kortego de tiu ĉi reĝo, notinte tiun ĉi faktan en siaj analoj, — ne mankis sin moki pri la reĝo kaj liaj korteganoj en esprimoj sufiĉe akraj. Mi ne scias, kiom da jaroj vivis en la mondo tiu ĉi ĥronikisto, sed estus al mi tre dezirinda vidi lin en ia ajn orduma societo je cent aŭ centkvindek jaroj post la tempo, kiam li skribis siajn analojn. Estus al mi dezirinda rigardi lin ankaŭ nun, por vidi, kion do li komencus fari: simple manĝi la viandon per helpo de manoj aŭ proponadi anstataŭigi la forkojn per ĥinaj bastonetoj aŭ per kia ajn alia ilo?

Permesu do al mi, estimataj sinjoroj, ekdeziri, ke por la efektiviĝo de nia ideo estu bezona pli mallonga limtempo kaj ke prosperu al ni ĉiuj resti vivantaj ĝis tiu momento, kiam oni kun miro rigardos kaj per ŝercetoj renkontos ne tiun homon, kiu riskis labori por la disvastigado de la ideo de l' internacia lingvo, sed tiun, kiu neniam aŭdis kaj nenion scias pri tiu ĉi lingvo.


A. M. Arnold.



### Aforismoj.

Ne ekzistas en la mondo tia forto, kiu povus estingi amon. *Nadson.*

La vivo estas epigramo, kies senco estas la morto. *Kastel.*



## El Heine.

### I.

Sur viaj vangoj flamas  
Varmego de somero,  
En koro regas vintro  
Malbona kaj severa.

Ĉi tio aliĝos,  
Ho, mia amtrezoro:  
Sur vangoj estos vintro,  
Somero en la koro.

### II.

La vivo estas tro fragmenta, jes;  
Mi iros al germana profesoro:  
Li scias ĝin plenigi kun sukces',  
Li sistemigos ĝin en unu horo;  
Per nokta ĉap' kaj ĉifonaj' diversa  
Li ŝtopos mankojn de la universo.

A. Kofman.



## Pri traduko de libroj de sankta Skribo en lingvon internacian.

En la vico de literaturaj produktaĵoj, kiujn posedas la homaro, unuan lokon okupas, sendispute, libroj de sankta Skribo. Kiel laŭ sia modela neimitebla stilo, tiel ankaŭ laŭ riĉeco, profundeco kaj grandeco de pensoj tiuj ĉi libroj ne havas similajn al ili en ĉio, kio estas skribita de homa mano. Por ĉiu homo, kiu sin okupas per tiuj ĉi libroj estas videble, ke tiuj ĉi libroj povis esti skribitaj nur per Dia inspiro, ke nur gvidata de Dio homa mano povis skribi tiujn ĉi grandajn literaturajn produktaĵojn. Ĉiuj ceteraj literaturaj produktaĵoj de ĉiuj centjaroj, de ĉiuj landoj kaj popoloj, ĉe komparado kun libroj de sankta Skribo estas vera sensignifaĵo, kaj por homoj estus pli bone perdi ĉion skribitan de ili, ol perdi tiujn ĉi mirindajn Diajn librojn, tiun ĉi netakseblan trezoron, tiun ĉi karegan havon de l' homaro. Kaj stranga afero! Homoj, laborantaj por nia literaturo, ĝis tiu ĉi tempo preskaŭ tute ne turnadis atenton al la libroj de sankta Skribo. Ili serĉis modelojn de literaturo en verkoj de diversaj verkistoj kaj indiferente pasis preter la sanktaj libroj, tiuj ĉi grandaj modeloj de literaturo. Por kio do ni tradukos kaj eldonos produktaĵojn de homa saĝo kaj vorto, se ni ĝis tiu ĉi tempo ne havas tradukon de produktaĵoj de saĝo kaj vorto Dia. La libroj de l' sankta Skribo havas, kompreneble, ne egalan indon kaj signifon. Ĉiuj ili, sendube, staras multe pli alte, ol ĉiuj homaj literaturaj produktaĵoj, sed inter ili estas libroj pli bonaj kaj malpli bonaj, pli gravaj kaj malpli gravaj por nuntempa homo. Al unua kategorio apartenas ekzemple: libroj de Moseo, evangelio, historio de apostoloj kaj kelkaj aliaj. Estas tre dezirinde, ke ĉiuj tiuj ĉi libroj estu eble pli baldaŭ tradukitaj en lingvon internacian, prefere la suprenomitaj libroj. Kompreneble, traduko de tiuj ĉi libroj devas esti farita de originalo, de homoj bone sciantaj la lingvon de l' originalo kaj ankaŭ la lingvon internacian. Traduko

de tiuj ĉi libroj devas esti trarigardita de eble granda nombro da personoj kaj fine redakciita de l' aŭtoro de nia lingvo. Ĉiu, kiu legis ion, skribitan en lingvo internacia de S-ro Zamenhof mem, konsentos, ke lia stilo estas plej perfekta, kaj io aparta: ĝi estas kaj simpla kaj facila por komprenado kaj ankaŭ tre bela. Tial la fina formo de tiaj gravaj produktaĵoj, kiaj estas la libroj de sankta Skribo, povas esti donita nur de persono plej bone posedanta la lingvon internacian t. e. de l' aŭtoro de tiu ĉi lingvo, kiu krom tio bone scias ankaŭ lingvojn de originalo de nomitaj libroj. Por tradukado de libroj de sankta Skribo devas esti kunmetita aparta rondeto el niaj plej bonaj kaj plej instruitaj verkistoj-tradukistoj. Ĉiu tradukisto devas traduki ian unu sanktan libron. Traduko de ĉiu libro devas esti trarigardita de ĉiu el la tradukantoj. Ĉiu tradukanto, trarigardante tradukon, faritan de alia tradukisto, faras siajn korektojn kaj rimarkojn, ne elstrekante skribitan de unua tradukisto. Kaj poste traduko kun ĉiuj korektoj iras por trarigardo al S-ro Zamenhof, kiu donas al ĝi la finan formon. Tiel per komuna laboro, povas esti ellaborita modela traduko de sanktaj libroj. Ĉiu povas kompreni, kian grandegan signifon por disvolvado de nia lingvo havus tia entrepreno, kaj tial mi ne parolos longe pri tio ĉi. Mi kredas, ke niaj amikoj-esperantistoj ne rifuzos oferi por tiu ĉi granda afero, kiu kiom povas, kaj tial tiu ĉi afero ne suferus mankon de materialaj rimedoj.

M. S. Rakitski.



### La unua kiso.

(El H. Säterberg, sveda poeto.)

Plej verda herb' — la plej unua,  
Plej bela rozo — la plej frua,  
Alaŭd' l' unua — plej kun ĝoj': —  
Plej bona — via kis' unua,  
Ho, donu ĝin . . . por ke la dua  
Ĝi estu en alia foj'!

Sig. Ag.



### Demandoj kaj respondoj.

#### 1. La fonetiko en Esperanto.

“Ĉiu vorto estas legata tiel, kiel estas skribata”... Mi ĉiam kredadis ke tiu ĉi regulo silente permesas ian aŭ alian escepton kaj ĉian literon, kies elparolado ne estas difnita en nia lernilaro, mi sekve elparoladas proksimume laŭ sveda prononcado. Sed sinjoro A. Kofman parolinte en n:o 3 (15) 97 de L. I. pri la diversa en ne-artaj lingvoj elparolado de vokaloj kaj montrinte ekzemplojn de sono-nuancoj en franca kaj germana lingvoj fortranĉas laflugilojn de miaj kapricoj per sekvanta decidita eldiro: “Tamen en la l. Esperanto ĉia litero havas *unu* difnitan sonon.”

En sveda lingvo havas du sononuancojn la vokaloj *a* kaj *e*: malfermita sono à è, kaj fermita á, é. En gramatikoj mi vidas ke samaj vokaloj ankaŭ en eksterversedaj naciaj lingvoj havas similajn nuancojn. Se nun “ĉiu litero havas *unu* difnitan sonon”, kiun el tiuj ĉi du sononuancoj — akcento gravis' à, è aŭ akcento akut' á, é, — havas en nia lingvo la literoj *a* kaj *e*? Kaj, se “cia vorto estas elparolata tiel, kiel

ĝi estas skribata“, kiel ni internacie elparoladu ekzemple la vortojn park', pardon', gard', kiujn ni svedoj prononceadas kun mallonga, malfermita vokalo — pã'rk, pã'rdõn, gã'rd — dume la angloj kontraŭe elparoladas la samajn vortojn pã'rk, pã'rdõn, gã'rd?

Mi estus dankema se niaj kondukantaj esperantistoj volus publike klarigi siajn opiniojn pri tiu ĉi demando kiel ankaŭ pri la esperanta fonetiko entute. Ŝajnas al mi, ke tiu ĉi fonetika flanko de nia lingvo estas tiom atentinda kiom la ortografia aŭ “barbariga“ skribado de naciaj nomoj.

P. Ahlberg.

## 2. Pri la uzo de la kazoj.

Mi turnas min al la L. I. por havi la solvon de tri demandoj pri la uzo de la kazoj.

A). La aŭtoroj esperantistaj uzas jen la nominativon, jen la akuzativon, ĉe substantivoj, kiuj estas predikatoj (atributoj) aŭ almetatoj (apozicioj) je vortoj en akuzativo.

Ekzemple:

1. — Homo . . . povas kompreni la *lingvon esperanto* (de Beaufront, Manuel complet, malnova eldono de Bonnard, pĝ 13).

2. — Si nomis *ŝin sia filino* (L. Z. Ekzercaro, § 17).

3. — Tio ĉi farus *lin homo* (L. Z. Dua Libro, pĝ 37).

4. — . . . ke ĉiu nomu *vin ombro* (L. Z. Dua Libro, pĝ 45).

5. — Se vi nomas *min Jefto* (L. Z. Hamleto, akto II, sceno 2).

6. — La Plejpotenca faru *nian venon* Por li *saniga* . . . (Hamleto, II, 2).

7. — La bela reĝo nomu *vin kateto*. (Hamleto, III, 4).

8. — *Kion* vi nomas *subteniloj*? (Hamleto V, 2).

Aliaflanke, ni trovas:

9. — Li nomas *nin malliberulojn* (Grabowski, Kondukanto, pĝ 31).

10. — . . . (patrujo) . . . atendas *Ŝin*, de Gudalo *heredinon*, De viva liberec' *filion* (Lermontow, Demonio, pĝ 10).

11. — Vi serĉas la *princon Hamleton*? (Hamleto, II, 2).

12. — . . . ŝi . . . La *sanktan ĵuron* de edzino faras *Similan* al la ĵuroj de ludistoj (Hamleto, III, 4).

Kvankam, laŭ la universala gramatiko, la akuzativo ŝajnas pli taŭganta, ol la nominativo, mi kun plezuro konus la opinion de L. I. pri la kazo kiu devas esti uzata.

B). Ĉu oni diru:

*Ricevu, Sinjoro, kun miaj antaŭaj dankoj, miajn sincerajn salutojn, aŭ: Ricevu . . . kun miajn antaŭajn dankojn, . . . ?*

Kiam L. Z. diras (Dua Libro, pĝ 46): *Ĝi estas trompi la landon kune kun la reĝidino*, — la nominativo, kiel al mi ŝajnas, signifigas ke la reĝidino ankaŭ trompas.

Oni komparu la frazojn:

Mi vidis *vin* kun *via amiko*; (mi kaj via amiko vin vidis);

Mi vidis *vin* kun *vian amikon*; (mi vidis vin kaj vian amikon).

En tiuj okazoj *kun* = *kaj*.

C). Kiun ni devas imiti, kiam ni legas:


Se mi *lin* prenis kiel *edzo* (Manuel complet, V-o *comme*).

Mi devas *lin* estimi kiel *sinjoron* (L. Z. Dua Libro, pĝ 42).

Kun multaj dankoj,

Via abonanto,

F. Chauffoureux.



# ANONCOJ.

## La gazeton **Lingvo Internacia** oni abonas:

- en **Ameriko** ĉe R. Geoghegan, *Tacoma*, Washington, U. S. A.
- „ **Francujo** ĉe L. de Beaufront, *Epernay*, Marne.
- „ **Germanujo** ĉe W. H. Trompeter, *Schalke*, Westfalen.
- „ **Hispanujo** ĉe A. Serapio, Pontevedra, *Silleda*.
- „ **Portugalujo** ĉe d:ro Costa e Almeida, *Rezende*.
- „ **Rusujo** ĉe V. Gernet, Jamskaja, 92, *Odessa*.

Ĉe tiuj ĉi sinjoroj oni mendas la gazeton kaj pagas al ili la abonpagon.  
En aliaj landoj oni mendas la gazeton aŭ per la poŝto aŭ rekte ĉe la redakcio, adr. *Uppsala*. La monon oni plej bone alsendas per poŝta mandato.

## Depot' da semoj

de M. I. Fedorovski

(Rusujo, Moskva, Mjasnickaja, dom Staĥejeva)

vendas ekonomiajn, legomajn, florajn kaj aliajn semojn de la plej bona eco La plena katalogo estas elsendata por 30 kop. en poŝtsignoj; al eksterrusaj aĉetantoj — senpage. La eksterrusaj mendoj estas akceptataj en la lingvo Esperanto.

## La Klubo Esperantista en Uppsala

invitas ĉiujn svedajn esperantistojn (kaj eksterlandajn esperantistojn kiuj vojaĝas en Svedujo) fariĝi anoj de tiu klubo. La enskriba pago estas kr. 1: —; jarpago ne estas por personoj kiuj loĝas ekster Uppsala.

## Sinjoro N. Arduin

komercisto en *Bordeaux*, 11 rue Turenne, Francujo, deziras trovi ĉie agentojn por la maklera vendado de liaj ruĝaj aŭ blankaj vinoj kaj ankaŭ de liaj brandoj.

Li plezure sendos sian kostotabelon al la Esperantistoj petontaj lin pri tio ĉi. Li rekomendas al ili la bonan kvaliton de siaj vinoj, garantiataj pri natureco kaj vinbereco. Estos ankaŭ por li plezuro respondi kaj informi tiujn el niaj amikoj, kiuj dezirus proponi al li la makleran vendadon de l' produktoj de ilia industrio aŭ komerco.

## Esperantistoj en Göteborg,

volantaj fondi klubon esperantistan, volu komunikiĝi je **Gustaf Siösteen**, redakcio de *Handelstidningen!*

## Enhavo de tiu ĉi numero.

	paĝ.
<i>La nova jaro de La Redakcio</i> . . . . .	1
<i>El Rusujo (publ. kurzoj) de V. Gernet</i> . . . . .	2
<i>El Francujo (la Paco per la Rajto) de René Lemaire</i> . . . . .	3
<i>Novajoj</i> . . . . .	4
<i>Letero al la redakcio de A. Z.</i> . . . . .	5
<i>Pri la celoj k. problemoj de la societo "Espero", parolo de A. M. Arnold</i> . . . . .	6
<i>El Heine de A. Kofman</i> . . . . .	13
<i>Pri traduko de libroj de sankta Skribo en lingvon internacian de M. S. Rakitski</i> . . . . .	13
<i>La unua kiso, de Sig. Ag. (trad.)</i> . . . . .	14
<i>Demandoj kaj respondoj: La fonetiko en esperanto, de P. Ahlberg</i> . . . . .	14
„ „ „ „ <i>Pri la uzo de la kazoj, de F. Chauffoureaux</i> . . . . .	15
<i>Anoncoj</i> . . . . .	16